# Kajeroj el la Sudo


*BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)*

**http://www.distrito.com/esperanto/k42.htm**

**http://members.xoom.com/Jesuo/k42.htm**



Ĉu Kosovo estas for?







Kion volas naciismo?
Kiu volas naciismon?



Nia Rh



Judoj kaj Vaskolando

**Nº 42** **Aprilo/Junio 1999**

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**



*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*

*Kasisto:* ***José María Bernabéu Franco***
*Gral. Primo de Rivera, 8*
*E-03 360 Callosa de Segura,*
*ALICANTE (Hispanio).*

*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*c/ Stª Teresa, 22-2º CD,*
*ES30 005 MURCIA*

*Libroservo:* ***María del Mar Gallego Guirao***
*Av. Juan Carlos I, 22-8º4*
*30 800 Lorca (Murcia)*

*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30 080 MURCIA*


*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la* **nova konto** *nº* ***1302 0412 86 0022655110*** *en libreta de Caja Postal. Sen aldona kosto.* La abono kostas 1000 pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvintancon oni ricevos.


*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Administro:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**


**Kovrilo**: Novaj desastroj de milito..., ĉu naciismo utilas al iu ajn? Kiu utilas al naciismo?

# Enhavo


Redaktore ........................................ 3
Informoj de la Prezidanto ............... 4
Granda Frato mensogas denove ... 5
Pri malriĉuloj kaj bezonuloj............. 6
Al mia kara instruisto ...................... 8
La teknikigita mondo ...................... 9
Pri la mito pri Internaciaj Brigadoj 13
Ni serĉas ......................................... 17
La krizo de HALE ......................... 18
Enkonduko en muziko .................. 19



Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mis-traktas iun ajn per-sonon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Redaktore

Ankoraŭ mi bedaŭras, ke en nia



antaŭa numero mi forgesis anstataŭi 1998 de 1999! Mi esperas, tamen, ke tio estu la plej grava problemo pri tiu numero, kaj ke legantoj de ***Kajeroj el la Sudo*** estu bonvolema kaj pardonema.

Jen nia nova numero de nia revuo, sufiĉe frue por la I-a Kongreso de HALE en Lorko. Por memorigi la eventon, ni produktis kompaktan diskon enhavantan ĉefe la tutan prelegon ***La Sindromo de Babel***, kiun mi diris antaŭ du jaroj, okaze de la Libra Foiro, kaj poste la sekvintan someron, okaze de la 9a Kongreso de VEF en Kasteljono. Mi intencis rediri ĝin hieraŭ denove, okaze de ĉi tiu kongreso I-a de HALE. Sed kvankam tio ne povis okazi finfine, la temo restas oportuna, kaj —laŭ indiko de samideano en Kasteljono— ni decidis disvastigi tiujn ideojn sub formato kompaktdiska. La enkonduka *Moderato* estas vere Studo 18-a de la verko 31-a de Fernando Sor. Mi elektis tiun pro ĝia eleganteco, kaj ankaŭ ĉar ĝi estas la etosa muziko de la prelego en Interreto de du jaroj (http://www.distrito.com/esperanto/sindrome.htm). JoMo kaj Liberecanoj kantas al *Blondulineto*, Jacques Yvart kontribuas per sia kanto al *Povra Marteno*, kaj Nikolin' pruntedonas al ni siajn *Melodio* kaj *Esperanto-knabino*. Mi ne rezistis la okazon aldoni himnon de Esperanto, *La Espero*. Du sopranoj ofertis ilian partoprenon, sed ili ne povis lerni la kanton sufiĉe frue. Tial mi mem devis anstataŭigi ilin... Finfine ili povis registri la kanton, sed la unuaj dekkvin kompaktoj jam estis faritaj! Bone, la celo de tiu kanto en tia ĉi disko estas lerniga, kaj tiusence mi kredas, ke ĉiu prezentita versio atingas tiun celon.

Pli pezigas nian koron tiu krizo en nia asocio, kiun ni priskribas en paĝo 18-a. En paĝo 5-a Trafo pensigas pri *Granda Frato* (kiu ajn li estas), je la 6-a Juan Antonio Cabezos priskribas *profesiajn malriĉulojn*, dum kamarado Antonio Marco Botella verkas pri la *Teknikigita mondo*, kaj en paĝo 13-a ni trovas personan vidadon pri *Internaciaj Brigadoj*. Komplementas nian kajeron ĉarma letero de Evaristo al sia kara instruisto de Esperanto. Ni finas nian kajeron kantante malnovan infanan pecon.

Mi esperas, ke la samideanoj senkulpigas min pro tio, ke la ***Kajero*** de aprilo estas la plej maldika, sed mi intencis disdoni ĝin okaze de la Kongreso de Lorka, I-a de HALE.

Ĝise kaj amike,

*Jesuo*

# Informoj de la prezidanto



Mi portas al haleanoj grandan kaj feliĉan novaĵon. La haleanoj havos la unuan kongreson en Lorko.

Diris Cato: *Dura lex, sed lex*. Tio estas: la lex aŭ kongreso povas esti forta aŭ malforta, granda aŭ malgranda, sed finfine estos kongreso.

Nia kongreso aprobos aŭ malaprobos miajn proponojn, sed tio ne estas grava. Kio gravas estas, ke estas la unua kongreso.

La kongreso donos al partoprenantoj memorigan kompaktan diskon, kun prelego kaj kantoj de kelkaj geesperantistoj. Ankaŭ la paĝo interreta *Esperanto España* aperas en tiu kompakta disko.

Mi volas proponi la jenajn aferojn por la kongreso:

1 Daŭrigi farante kongresojn kune kun la Valencia Federacio de Esperanto kaj Murcio.

2 Daŭrigi la sendependo de HALE.

3 Disvastigi HALE ĉe sindikatoj kaj junuloj.

4 Propagandi HALEn kaj Esperanton inter ne esperantistaj medioj, kiel asocio de nudismo, vegetaranismo, ktp.

5 Plibonigi la financojn de HALE.

6 Apogi asociojn fratajn.

7 Daŭrigi la kurson de Esperanto en ejoj neesperantistaj.

8 Daŭrigi la eldonaĵon de ***Kajeroj el la Sudo***.

9 Daŭrigi la paĝon interretan ***Esperanto España*** kiel medion por propagandi HALE kaj Esperanton.

10 Daŭrigi la aĉetado de iloj por plibonigi la eldonaĵon de ***Kajeroj el la Sudo***.

11 Krei datbazon pri asocioj frataj kaj amikaj.

12 Pretigi apartan kurson por junuloj.

13 Kunlabori kun la Hispana Esperanto Federacio kaj la Valencia Esperanto Federacio.

14 Kunlabori kun SAT per artikoloj kiu povas esti eldonitaj kaj en ***Kajeroj el la Sudo*** kaj en ***Sennaciulo***.

Tio estas mia programo, kiu, kiel la Respublikana Partio de Usono diras, *estas la kontrakto* inter HALE kaj la haleanoj. Se ni povas realigi tiujn 14 punktojn de tiu programo, ni havos fortan asocion, sed se ni ne povas realigi la programon, ni estos kiel ni estas; tio estas: tiu ĉi malgranda asocio kaj malforta asocio ankaŭ.

Amike kaj kamaradece,

*Juan Antonio Cabezos Martínez*




George Wells denoncis Grandan Fraton antaŭ 50 jaroj. Temis pri ulo, kiu cerbobanis civitanojn ĝis ili kredis firme tion, kion li volis, ke ili kredu.

Kvankam li akre kritikis komunismon per siaj trafaj noveloj, multe da liaj ideoj povas esti aplikata al aktuala mondo. En la kvardekaj kaj kvindekaj jaroj neniu havis tiom da povo en siaj manoj kiel Jozefo Stalin, en kiu multoj volis vidi tiun *Grandan Fraton*, kaj efektive li povis fari —eĉ oni asertas ofte, ke li ja faris— tiujn abomenindajn aferojn priskribitajn de Orwell en *1984*. Sed 1984 jam venis kaj iris, kaj feliĉe Stalin ankaŭ iris. Aliaj diktatoroj ankaŭ venis kaj iris, sed ili ne plu havas tiom da povo kiom *Tristiga Joĉjo* havis. Ekzistas, tamen, homo, kiu havas tiom da povo -se ne plu- kiom Stalin havis. Metodoj ŝanĝis, sed ne la celo: regi la mondon. Oni povas argumenti, ke Josef Stalin regis dum multe da jaroj, dum Bill Klinton ne povas regi pli ol kvar jaroj. Bone, mi ne parolas pri Bill Klinton, sed pri la Prezidanto de Usono, kiu ajn li estas. Usono estas la sola imperio, kiu restas en la mondo. Oni memoras tiun konkludan aserton: *Caesar loquita, causa finita* (Cesaro parolis, afero finita). Hodiaŭ ekzistas multaj internaciaj organizacioj, sed ili gravas nur kiam Usono apartenas al ili. La Unuiĝintaj Nacioj povas decidi aŭ argumenti por aŭ kontraŭ gravaj aferoj, sed la sola decida povo en la reala mondo estas la usona povo. Ni memoru pri tiuj vortoj diritaj de Koffi Annan: *Hodiaŭ estas trista tago por Unuiĝintaj Nacioj*. Li referis al bombofalado sur Irako antaŭ kelkaj semajnoj. Verŝajne irakanoj ne povas sendi siajn aviadilojn ĉien en sia propra lando. Usonanoj timas, ke li povas sendi sian aviadilon por bombadi kurdojn. Sed kurdojn oni mortigas en Turkio, kaj la turka aviadilaro estas permesata ĉien en sia propra lando...

La usona parlamento preskaŭ demisiigis la prezidanton de sia lando, sed ne ĉar li ordonis ataki fremdan landon nur pro suspekto, sed ĉar li mensogis pri sia privata vivo. La afero estis traktita vaste laŭ la mondo.

Nun la afero turniĝis eĉ pli drame, pri la disiĝo de Jugoslavio. Antaŭ kelkaj jaroj, mi memoras, estis paco tie. Nun anstataŭ la tiama nura ŝtato estas ses diversaj sendependaj nacioj. Kaj sekvis milito al ĉiuj disiĝoj.



Sed ni parolu pri tio la venontan numeron. Ni trovos novajn mensogojn...

*Trafo*

# *Pri malriĉuloj kaj bezonuloj*

Laŭ Markizo de Sade, malriĉuloj estas kaŭzataj de riĉuloj, kaj tiuj ĉi



bezonas tiujn plie ol inverse. Tial estas kritikenda la kristana koncepto de karitato, ĉar ĝi maleblas malaperon de malriĉeco.

Kion la Markizo prezentis estas ekzisto de *profesia malriĉulo*: lia ekzisto baziĝas ne sur tio, ke li ne havas ekonomian rimedojn por vivi, sed al ekzisto de riĉuloj mem, kiu praktikas karitaton.

Sade skribis pri tiu koncepto de *profesia malriĉulo* ĉe sia libro ***Kamerina filozofo***, kaj tion farante li laŭtparoligis ideon pri ilustriuloj pri karitato.

Kontraŭ kristana karitato, kiu




kreas profesiajn malriĉulojn, ni havas la ilustritan ideon pri *filantropio*: fari bonon. Fari bonon signifas, inter alie, helpi bezonulon. Kiel gravas la penso de Markizo de Sade je la fino de la 20-a jarcento? Ĉiel, ĉar ni vivas sub sindromo de NRA (Ne Registaraj Asocioj, hispana ONGs) kaj de tiu, ke malriĉeco ĉe la *Tria Mondo* estas nia kulpo.

Sufiĉu du ekzemploj: antaŭ malmulte de tempo NRA mendis averton kie malnutrita infano aperis kune kun la mesaĝo *po 500 pesetoj* (3 eŭroj) *vi povas nutri infanon en la Tria Mondo.* La celo de la mesaĝo estas klara:



kulpigi televidantojn por tio, ke ili subtenu kampanjon de kapto de mono. Same kiel kristanaj eklezioj aplikis moralon kulpigantan, alitempe, for financi siajn ekonomiajn bezonojn.

La dua ekzemplo: antaŭ unu jaro privata televido organizis konkurson kies celo estis patronigi infanojn triamondajn. En raporto televida aperis centramerikana virino dirante, ke ŝi *havas kvin infanojn kaj nur mankis ĉi tiu por*

*patronigi, ĉar la aliaj jam havas patronon.*

Sekvas el tio, ke tiu centramerikana patrino havis kvar patronigitajn geinfanojn, kiuj subtenigas ŝin.

Se profesia malriĉulo estas etike rifuzenda, karitata profesiulo estas eĉ pli abomeninda. Tradicie profesiulo pri karitato estas reprezentata de kristanaj eklezioj, tiel katolika, kiel protestantaj kaj ortodoksaj.

Amiko mia eksvicdirektoro banka rakontis al mi tiun anekdoton: *monaĥinoj de ...* (ni ĵus ne memoru) *almozpetis la klientojn kiuj estis en la bankoficejo, dum en la oficejo de la direktoro la monaĥestrino negocis kun ni kie investi siajn du mil milionoj, kaj ni tiam dubis ĉu aĉeti publiktrezorajn bonojn aŭ akciojn de tiu firmao de La Beatloj.*

Kaj por fini tiun parton de mia artikolo, mi alportas mian propran eksperton. Mi helpis ekonomie misiojn kiujn jezuitoj havis en Bharato ĉar mi ŝatis tiun sistemon, kiun ili uzas, pro tio, ke mi pagis nur por projektoj konkretaj, kiel fari puton, konstrui lernejon, kaj tiel plu. Ĝis iun tagon mi ricevis leteron per kiu oni petis mian monon por konstrui seminarion. Ekde tiu tago mi neniam plu sendis monon.

Moderne aperis kiel profesiuloj de karitato NRAj, kiu havas entreprenan strukturon, demarŝas buĝetojn pli gravajn ol tiuj de multaj entreprenoj, kaj ili anoncas sin per televido.


Pro ĉiu tio endas, ke oni repuŝu tiun koncepton de malriĉulo, kaj oni uzu tiu de *bezonulo*; oni ankaŭ forpuŝu tiun karitaton *nra-an* kaj *eklezian*, kaj anstataŭu ĝin de ilustra koncepto de *filantropio*. Filantropio estas fari bonon, kaj tio estas kion esperantistoj faras kiam ni pagas kotizon al ***Sennaciulo*** por bezonantaj esperantistoj.

*Juan Antonio Cabezos*



# Al mia kara instruisto, respekteme kaj ame...

Mi salutas, mirata majstro, la horon kiam mi unue eniris vian klason. Vi montris al mi novan manieron rilati al aliuloj kaj respekti alies pensemojn.



Afero ekzistas, tamen, kiu kontraŭdiras tion. Mi memoras, ke vi uzis tiujn vortojn, *erari* kaj *fuŝi*, kvazaŭ ili ambaŭ estus sinonimoj. *La diferenco*, vi asertis, *estas ĉe la uzo de tiuj vortoj: erari estas netransitiva, transitivas fuŝi. Mi persone preferas la duan, ĉar scii kion oni fuŝas ege plibonigas la propran uzon de Esperanto*.

Bedaŭrinde, mia sperto laŭ tiom da jaroj ekde kiam vi instruis Esperanton al mi montras, ke transitivo bezonas aganton. Oni eraras kutime kontraŭvole kaj senscie; sed oni ne povas diri tion pri fuŝo. *Vi fuŝis la aferon!* (hontinde!); sed *vi eraras*... (kompatinde). Tiel, diri ke eraranto fuŝas iel insultas lin -aŭ ŝin-. Male, diri ke fuŝanto eraras iel ajn senkulpigas lin -aŭ ŝin-. Erari malkaŝas ignoron, fuŝo malkaŝas mankon da bonvolo. La unua bezonas helpon; la dua, baton.

Ĉio igis min repripensi vian opinion, mirata (ne gravas kiom disvastigita ĝi estas), pri *transitivo*. Veras, ke en la hispana, la franca kaj eĉ la angla (kaj mi sekve emas pensi, ke okazas same en la aliaj miloj da lingvoj ignorataj de mi) estas listoj pri verboj *transitivaj* kaj alia listo pri verboj *netransitivaj*. Estas stranga afero, ke la hispana kaj la angla listoj ne koincidas: *mírame* transitivas hispane, sed maltransitivas la angla *look at me*. *Óyeme* transitivas, sed ne *listen to me*.

Plia fenomeno estas, ke vi, kara instruisto, *instruis* dum kvardek jaroj. Pro tio, ke vi instruis, vi estis instruisto. Oni ne bezonas diri *kion* vi instruis por pruvi, ke *vi instruis*. Se oni klarigas, ke vi *instruis Esperanton*, oni *transitivigas* la vorton *instrui*. Mi, aliflanke, *lernis Esperanton* el via mano. Pro tio, ke mi tion lernis, mi estis -mi ankoraŭ estas, feliĉe-, lernanto. Tio signifas, ke *mi lernas* ekde dudek jaroj. La lasta frazo sentransitivigas *lerni*...

Kion signifas mia parolado? Bone, mi tute ne zorgas pri gramatiko aŭ vortaro. Oni diras, ke gramatiko estas kvazaŭ instrukcioj *manlibraj* por kompreni kiel lingvo funkcias. Kiam oni funkciigas lingvon bone, oni ne plu bezonas gramatikon... Nu, mi zorgas nur pri **komuniko**. Lingvo ne estas io por montri kia saĝulo oni estas, aŭ kiel lerta oni estas. Lingvo -pleje Esperanto- estas nur ilo por komuniki. Tio portas min al penso, ke se blindulo estas tiu, kiu *ne vidas*, *pentristo* estas tiu, kiu *pentras*, kaj *verkisto* estas tiu, kiu *verkas*, tiu uzado de tiuj vortoj ne devigu nin serĉi aliajn vortojn por esprimi, ke mi *vidas belulinon*, ke mi *pentras ĉarman bildkarton*, aŭ ke *verkas mi ĉi tiun artikolon.* Maniistoj gramatikaj restu for el aktiva kaj viva Esperanto!

Alian tagon mi parolos pri PIV kaj PAG, mi promesas...

**Evaristo**

# La teknikigita mondo




Antaŭ kelkaj tagoj mi legis interesan verkon pri la percepto de la homa vivo dum la 21-a jarcento, ĉe kies sojlo ni troviĝas. Temas pri grava studo de, laŭŝajne, fantazia mondo, por kelkaj studemuloj reala kaj promesplena, kiun la teknologio puŝas nebremseble al galaksioj de la nekredeblo, kaj antaŭ tiu nia menso infaniĝas, ĉar ne povas ĝin bone kompreni. Kaj tamen estas la vojo kiun ni sekvas, speciale dum tiu ĉi jarcento jam finiĝanta.

La aŭtoro de tiu interesa libro, Antonio Dyaz, krom verkisto estas biologo, muzikisto, dokta pri informadiko kaj reganto de pluraj avangardaj teknikoj, kiuj ebligas al li ne nur analizi ĝis kia nivelo oni situas en tiu ĉi momento la homa vivo sub vidpunkto de la teknologio, sed ankaŭ invadi la neantaŭvideblan futuron nekredeble proksima. Mi opiniis oportuna komenti ĝin, ja tiu mondo apenaŭ se estas rigardata de la esperantista mondo.

Kiel decas laŭ mia vidpunkto, li komencas sian studon analizante la difinon de la librotitolo (la sama de mia artikolo), ja la tuta verko rondiras ĉirkau ĝi. Mi konfesas, ke mi troviĝas antaŭ simila problemo ol li, kun la aldono de la deviga esperantigo (malfeliĉe mia esperanta vortaro ne galopas tiel rapide kiel la tekniko kaj sekve ĝi ankoraŭ statas ne sufiĉe modernigita), do forlasante la tenton meti en la titolon la esprimon *fikcia mondo*, ĉar ofte ni renkontiĝos en nia priskribo ke io, kion ni nomas *fikcio* fakte iĝas tuŝebla realo, do forlasante tiun fonemon, ĉu ni uzu la terminon *artifika, artefarita* aŭ *teknikigita* mondo? La unua vorto difinas mondon lerte aŭ ruze farita, sed implicas certan trompon aŭ iluziigon; la dua havas similan difinon sed nuancita per certa arto-ideo; la tria, kiun mi plene akceptas, difinas la mondon rezultantan el apliko de la tekniko kaj ties sekvoj, do miaopinie, kiel esperantista versio mi decidas: *la teknikigita mondo*.

La aŭtoro de la libro donas pli ampleksan difinon, kiu ne plu estas tiu, kiun ni kutime trovis en niaj vortaroj, t.e.: *ĉio farita per la homa mano*, sed alia ne tiel facile komprenebla: *ĉio, kio per si mem ne kapablas aperi spontane ekster la homa medio*. Pli konkrete, por li tiu *teknikigita mondo* estas tiu, en kiu nur ekzistas tio, kion oni povas percepti. Lia difino de la perspektivo pri la teknikigita mondo estas akceptebla, sed tute ne lia filozofio; kaj en miaj konkludoj mi rezonos kial.

Tuj, la verkisto komentas, ĝis la punkto nia vivo estas jam envolvita de la teknologio: la elektriko, radio, aŭtomobilo, televido, medikamentoj kaj nutraĵoj pretigitaj en laboratorioj, laboriloj ĥemiaj sterkoj, informatiko-instrumentoj, kaj por ne plenigi paĝojn kaj paĝojn, longega listo de produktoj kreitaj de la teknologio, kiuj efike helpas la vivadon de la homo en nia planedo. Ni jam alkutimiĝis al ili, eĉ ekzistas kelkaj, kiuj eniras en la internon de ni por ŝanĝigi niajn sensojn: la kuraciloj, alkoholo, certaj drogoj kaj alia longa listo de produktoj: de tiuj, kiuj mildigas aŭ nuligas niajn dolorojn al tiuj, kiuj donas al ni la sensacon de neimageblaj plezuroj. Al tio aldoniĝas certaj ĥirurgiaj teknikoj, kiel la starigo en nia korpo de kristala-fibra kokso, koro-valvoj, silikonaĵoj kaj multaj aliaj aparatoj, tuboj kaj pecoj, kiujn la ĥirurgoj instalas en la korpo de malsanuloj anstataŭante difektitajn organojn.



Kune al tiu teknologio kiu nin ĉirkaŭas funkcianta en nia domo kaj ĝenerale en nia ĉiutaga vivo, ofte eĉ sen nia propra rimarko, ekzistas alia jam ĉe la sojlo de niaj hejmoj sin anoncanta, kiu denove ŝanĝos nian ordinaran vivon, temas pri la informadiko: antaŭ apenaŭ du jardekoj naskiĝis *Internet*, kiu baldaŭ ebligos ke la tuta ekonomio de la homoj, la hejmoaparatoj kaj eĉ niaj amuzoj funkcios tra tiuj kanaloj. Tri kvaronoj de la libro emfazas la *miraklojn* de la informadika reto, la eblojn kiuj prezentas tiun teknikon kaj la futuron de tiu mondo preskaŭ nekonata de la plej granda parto de la homaro, escepte de informadikaj fakuloj, kies

ekzemploj mirigas nin: li indikas la *ciberspacon** kiel la unua provo por la kreo de mondo paralela al la nia, regata nur de la percepto, kie la homo povos malvolviĝi, interrilati sin kaj vivi en medio kie spertoj la plej diversaj estos eblaj per teknologio, ka laŭ li *tio, kio gravas nur estas kion oni perceptas*. Li intencas tiel rezonadi: *se ni vivas en valo plena de floroj, kie belaj birdoj trilas kaj infanoj ludas apud rivero kaj studas la lastajn tekniko-sciencojn, kie la atmosfero donas la korektan miskaĵon de oksigeno, nitrogeno kaj hidrogeno, ĉu multe gravas se la floroj estas la sekvo de genetikaj eksperimentoj aŭ naturnaskiĝintaj? Ĉu vi povas imagi natura mondo plena de bestoj en la adekvata ekosistemo: riveroj, arboj, floroj, pura aero, ĉio projektita laŭplaĉe en laboratorio?* Cetere li opinias, ke la kreo de privataj mondoj ene de ni mem, jam atingebla per *Internet* estas la enviinda futuro de la homaro. La verkisto de nia komentita libro certigas, ke en Usono kaj Japanio ekzistas jam privataj societoj, kiuj preparas grandegajn buĝetojn por realigo de spacaj projektoj, kiuj iras de la starigo de urboj en la planedo Marso kaj en la Luno ĝis la klonado de belegaj knabinoj kaj fantaziaj bestoj... Io tute neimagelba! En tiu ĉi momento jam eblas viziti per *Internet* la plej interesajn urbojn kaj lokojn de la mondo, arbarojn kun ties bestoj aŭ ĝui agrablan nokton kun belulino...

La verko de Dyaz indikas kiel uzi la reton por eviti altajn kostojn, trompojn, ŝtelojn kaj aliajn fraŭdojn de senskrupulaj *navigantoj*. Ankaŭ kiaj risortoj oni devas manipuli nesperta reto-uzantoj por trovi servoj en la reto, kiel atingi senti kvazaŭ aŭtentajn emociojn aŭ nematerian seksumadon, uzi mortdanĝerajn videoludojn, ĥemiajn paradizojn, fikcian medion kaj aliajn risortojn de tiu teknologio ankoraŭ ne bone konatajn aŭ tute nekonatajn de la plejmulto.

Kio gravas por ni, esperantistoj, de tiu mondo de *Internet*? Unue, ke la uzanto ne trovas barojn: landlimojn, lingvajn malpermesojn aŭ ekskluzivismajn politikojn. Iu ajn povas meti en la reton siajn teoriojn , kredojn aŭ propagandon, libere esprimi en ĝi la plej avangardajn opiniojn, elekti lingvon, serĉi interesan temon, sin dokumenti pri iu ajn specifa temo, konsulti bibliotekojn, legi la lastajn librojn eldonitajn, kaj tiel plu. Ekzemple, tre bona amiko mia, amanta kiel mi mem la kulturojn de

**ciberspaco*: viveroj kreataj per Internet.

antikvaj popoloj, ofte konsultas la bibliotekojn de Kairo, Vaŝingtono aŭ Parizo kaj fotokopias antikvaj dokumentojn kiujn ni poste uzas en niaj beletraj  kaj kulturaj taskoj. Ekzistas ankaŭ en *Internet* certa libro enhavanta serion da libroj, el kiu aperas en unu aŭ diversaj lingvoj reprodukton de lastaj eldonoj de noveloj, prisciencaj traktatoj, informadika literaturo aŭ telematiko**, kaj mil kaj unu temoj kiuj povas interesi la homon: je la fino de 1998 oni komercigis unu el tiuj gigantaj libroj kontraŭ pago de 300 dolaroj.

Kio estas dezirinda por la bona evoluo de *Internet*? Ke simile kiel okazas jam en Usono kaj Kanado, modernigi la teknikon en Eŭropo uzante elektrikan reton por malaltigi la prezojn kaj ebligi ĝian uzon al ekonomie modestaj homoj.

Kio tute ne plaĉas al mi de tiu interesa libro? Tiu kvazaŭ mistifiko de la reala vivo: por tiu verkisto validas ĉio kio estas fikcia, artefarita aŭ teknikigita. Tute ne interesas la mondo de la ideologioj, de la pensado de la homaj valoroj. Tio estas tiel subtaksata, tiel ne ŝatata, ke li rekomendas al pensantaj homoj kaj tiuj pli ol kvardekjaraj ne legi la verkon: li ne respondecas pri eventualaj psikaj malsanoj kiel sekvo de la librolego...

Ĝis nun miaj impresoj pri tiu libro interpretanta la teknikigitan mondon. Evidentas, ke la temo tute ne elĉerpiĝis. Estas unu el la grandaj defioj de nia tuja futuro. Ĝis kiam la laboristaro restos akirita en la sociaj kaj politikaj teorioj de la 19-a jc? Ĝis kiam ni toleros ŝovinismajn politikojn kaj agresemajn naciismojn de antaŭ longe kadukaj kiel civilizacioj? Kiam ni, laboristoj, decidos transsalti ĉiajn barojn kaj unuiĝos por alfronti la kapitalismajn politikojn nun jam regantaj en la tuta mondo? Ĉu ni restos pasivaj antaŭ la defio de la informadika teknologio jam antaŭ ni?

Mi esperas, ke aliaj samideanoj komentos ĉi tiun temon ĉu sub alia aŭ sama vidpunkto, ĉar temas pri afero tre interesa kaj tre aktuala: la teknologio kaj novaj vivoformoj je la atingo de niaj manoj...


*Antonio Marco Botella*




**telematiko: temas pri branĉo de la inĝeniera tekniko kiu pritraktas la informadon longdistance, uzante precipe satelitojn.

# Pri la mito pri Internaciaj Brigadoj

Antaŭ kelkaj monatoj mi legis la interesan kaj klarigan libron ***Las Brigadas Internacionales***, verkita de historiisto kaj juristo César Vidal (publikigita en la serio *Eseo kaj penso* de Eldono Espasa, Ctra. de Irún, km 12.200, 28049 Madrid, Hispanio), kaj kvankam mi ne antaŭ nun havis tempon sufiĉan por verki seriozan recenzon, mi tamen konsideras oportune fari ĝin, ĉar kelkajn artikolojn ni povis legi pri la afero kaj en ***Kajeroj el la Sudo*** kaj en aliaj magazinoj. Ni jam havis vidpunktojn personajn el partoprenantoj en la milito mem, kaj ankaŭ el ideologojn. Nun ni eblas havi sciencan historian vidpunkton.




César Vidal asertas (paĝo 14-a), ke li ekverkis tiun libron pro tri kaŭzoj: *unue*, oni jam povas konsulti sovetajn arĥivojn, aparte tiujn de la *Kominterno* (Komitato Internacia, organo de propagando de la ŝtalinisma ŝtato Sovetunio); *due*, pro tio, ke la Komunista Bloko malaperis, oni povas kontakti brigadistojn el ĉiuj landoj, kaj kontraŭstari iliajn informojn al tiuj jam haveblaj delonge; kaj *trie*, li eblis konsideri la temon el scienca kaj dokumentita sinteno.

La 14-an de aprilo de 1931 komencis la Dua Respubliko de Hispanio, post la borbona Reĝo Alfonso XIII-a demisiis. La popolo referendumis, kaj ĝi ne volis reĝon. Provizora Registaro provis solvi urĝajn problemojn, kiujn Hispanio havis de antaŭ multaj jaroj: inan voĉdonon, organizadon de agrikulturo,

restrukturigon de la armeo, religian liberecon, aŭtonomiojn, kaj aliajn. Du jaroj poste Hispanio balotis, sed dekstruloj venkis. Ilia partio, CEDA (Konfederacio Hispana de Dekstroj Aŭtonomaj), celis *nuligi la sistemon elinterne* (p. 28-a), kaj sekve ili malplialtigis la salajrojn de laboristoj, senlaborigis anojn de socialismaj kaj anarĥiistaj partioj, elkarcerigis puĉintojn militistajn, kiuj en 1932 provis forpuŝi la registaron, kaj redonis al ili siajn antaŭpuĉajn postenojn, kaj enkarcerigis sindikatajn gvidantojn. Nemirinde ĉiuj maldekstraj partioj kaj sindikatoj unuiĝis en *Popola Fronto*, kaj en la baloto de 1936 (la 16-an de februaro) ili venkis.

Nur kvar monatojn post tio komencis la militon. Generaloj Franco (pr. franko), Sanjurjo (pr. sanĥurĥo), Varela, Goded, Queipo de Llano (pr. kejpo de ĝano), Aranda, Cabanellas (pr. kabaneĝas) kaj Mola leviĝis kontraŭ la ŝtato. La puĉo ne sukcesis ĉie en Hispanio, kaj la nacio estis dividita. Ĉar la afero ne progresis, la ribeluloj petis helpon al nazia registaro de Germanio kaj al tiu faŝista de Italio, helpon, kiun ili obtenis facile. La demokracioj de Okcidento, male, rifuzis helpi



Puĉantoj Franco kaj Mola kun Kardinalo Segura kaj aliaj reprezentajtoj de la oficiala eklezio.

demokratian Hispanion, ŝajne pro timo al milito kontraŭ Germanio. Nur Rusio estis preta vendi sian helpon.

La pezo de la Brigadoj Internaciaj en la Hispana Intercivitana Milito estis ĉiam troigita, laŭ César Vidal. Dekomence, venis privataj eksterlandanoj por helpi la Respublikon, kaj ili faris tion elkore. Ili aliĝis en milicojn popolajn kiel tiujn de NKL (CNT),

POUM kaj aliajn, laŭ ilia politikaj kaj personaj sintenoj. Al tiuj grupoj aniĝis famaj *brigadistoj* kiel Ernest Hemingway, Arthur Koesler aŭ George Orwell. Fakte tiun lastan brigadistoj provis mortigi.


George Orwell

Kominterno devigis naciajn komunistajn partiojn organizi grupojn de voluntuloj por translokiĝi al Hispanio lukti por la Respubliko. Tamen, la tagordo estis kaŝi la komunista origino de la afero: ili devas aserti, ke *temis pri spontana oferto de individuoj el pluraj landoj* (p. 61-a). Kiam ili estis en Hispanio, oni elprenis iliajn paŝportojn *por ne sciiĝi, ke alilandanoj batalas, kio estas kontraŭ internaciajn traktatojn*, sed vere Kominterno uzis tiujn paŝportojn por siaj propraj interesoj, kiel murdo de Trotsky en Meksiko fare de hispano Ramón Mercader, kiu uzis usonan paŝporton… (p. 66-a). Multaj voluntuloj venis al Hispanio pro falsaj promesoj trovi laboron..., kaj kion ili trovis estis pafilon, aŭ la alternativon esti mortpafita se ili rifuzis.

Ne estas klare, ĉu la Brigadoj Internaciaj utilis al la Respubliko, sed ili ja utilis al Sovetunio. Kiam la respublika militestraro ordonis Generalon Kleber (estro de la brigadoj) defendi Madridon, li ne obeis ĝis la soveta konsilanto Goriev tion permesis du tagojn poste. Madrido jam estis savita de regulara armeo kaj civitanaro, tamen freŝaj trupoj (malpli ol du mil soldatoj) levigis la moralon al madridanoj, kaj tio iniciatis la miton pri la Brigadoj Internaciaj.



Kleber

César Vidal lumigas pri la *sukcesoj militaj* de la brigadistoj, kiuj kutime estis heroaj, sed nekompetentaj pri milito. Ĝiaj estroj ne estis elektitaj inter la plej bonaj strategistoj aŭ militistoj, sed inter la plej bonaj komunistoj. Sekve, Harris (estro de la Brigado *Lincoln*, p. 124-a) kaj Smotov (estro de la Brigado *Sans Nom*, p. 98-a) pruvis ilian malkuraĝecon antaŭ la malamiko, sed ili ne ricevis pafmorton -laŭ ĉies milita kodo- sed translokiĝon al Usono kaj Francio respektive, kie ili povis servi komunismon. Male, pli bonaj

batalantoj estis pafmortigitaj por averti al eblaj fuĝontuloj kaj dizertuloj.

Apartan konsideron meritas la rolo de vaskoj proksime al la fino de la milito: Julio Jáuregi, reprezentanto de la Partio Naciisma Vaska (PNV) renkontis reprezentanton de Franco por pritrakti la kapitulacion de Eŭskio. Aldone, ili malebligis, ke la respublikana armeo detruu faktoriojn en Vaskolando por ke ilin ne ekposedis la armeo de faŝistoj. Ili perfidis la planojn de la Respubliko por provi savi la Nordon de Hispanio, kaj eĉ klarigis al la faŝistaj fortoj pri la plej oportuna loko por invadi Santanderon (p. 204-a).

La Brigadoj Internaciaj havis neniam pli ol 25 000 militantoj en Hispanio. Tio estis ridinda kvanto, konsiderante la nombron de batalantoj, eĉ konsiderante nur la mortintoj en la milito (500 000). Tamen, propagando troigis tiel ilian gravecon, ke multaj personoj ankoraŭ kredas, ke ili estis gravegaj en la Hispana Intercivitana Milito. Milite —eĉ se tiuj brigado sukcesus batale— ili estis nur guto da akvo en maro da morto kaj malfeliĉo. Sed *propagande* ili ja venkis. Pro tio, ke oni ne kutime ŝatas historion, ne ŝatas scii, kaj ne ŝatas politikumi, sukcesis la mito pri la Brigadoj Internaciaj. La lasta —fina— venko de la Brigadoj okazis la 10-an de novembro de 1995 -sesdek jaroj post sia apero-, kiam la Hispana Parlamento aprobis doni hispanan civitanecon al ĉiuj restantaj anoj de la Brigadoj Internaciaj. Inter la aprobantoj estis anoj de partioj, kiujn Kominterno volis ekstermi, kiel PSOE (partio socialisma laborista hispana). Preskaŭ la tuta civitanaro salutis tiun *oportunan* kaj ŝajne *finpunkta* decidon, eĉ anarĥiistoj kies prasamideanoj suferis maljustecon kaj malamikecon de tiuj brigadoj. Tiu aprobanta civitanaro eble ne sciis, ke la registaro legitima de Hispanio siatempe ne volis akcepti la Brigadojn Internaciajn sur la sojlo hispana, kaj ili finfine aprobis ilin kiam la Brigadoj jam estis translokigitaj en Hispanion antaŭ kvar tagoj, en Albacete. Eble tiu civitanaro forgesis, ke Andreu Nin estis


Novhispano eksbrigadista

murdita de brigadistoj kiuj sinŝajnigis kiel anojn de *Gestapo*. Tial, pro sia nescio, la hispana civitanaro kredis, ke la afero estis meritita gesto al personoj, kiuj agis nur el seninteresa, nobla kaj senkulpa sento intencante nur detrui faŝismon, ago kiu komencis en la milito hispana kaj finis je la Dua Mondmilito. Tiu ĉi libro de César Vidal pruvas male.

Kaj mi asertas tion post legi la 24 apendicojn kaj la 70 biografiojn pri personoj cititaj laŭ la verko, krome de la neatakeblaj rezonadoj de la verkisto. Komplementas la libron la 46 paĝlonga bibliografio kaj la analiza indekso. Estas bedaŭro, ke la verko ne estas esperantigita, sed indas rekomendi ĝian legadon al vi ĉiuj kiuj regas la hispanan kaj volas havi klarajn ideojn pri nia ĵusa pasinto.




## *Ni serĉas*

La sekvantajn samideanojn, kies ekzemplerojn de ***Kajeroj el la Sudo*** la poŝto resendis al ni pro nekonata adreso. Bonvolu komuniki al ni kiam via adreso ŝanĝas aŭ vi ne plu volas ricevi nian magazinon, ĉar ĝi povas elspari monon al ni. La samideanoj estas:

—Ruperto Vicente Pérez, de Valencia,

—CNT de Granada,

—Madrida-Esperanto Liceo.

# *La krizo de HALE*

Dum multaj jaroj kamarado Marteno Bustín Benito estis Prezidanto de HALE, tasko kiu lacigis lin. Pro tio li demisiis kaj María del Mar Guirao Gallego anstataŭigis lin. Poste, Juan Antonio Cabezos, krom sia posteno kiel Prezidanto de VEFkMu, akceptis la oficon de Prezidanto de HALE. Li prezentis skipon, por ke ili helpu lin en sia agado. Li kredis, ke li povis kalkuli je ĉiuj de li proponitaj, eĉ se li ne povis aranĝi la aferon sufiĉe frue antaŭ la prezento de sia skipo al la balotanaro.



Bedaŭrinde, la proponita de li vicprezidanto respondis, ke li ne volas *gvidi ŝipon kies tripulacio volas submarigi ĝin, aŭ almenaŭ ne gravas al ili, ĉu la ŝipo atingos havenon*. Laŭ li la rilato inter la haleanaro ne estas sufiĉe bona, kaj tiel oni ne emas kunlabori.

Pro tio, ke la Prezidanto, la ĝis nun Vic-prezidanto kaj nuna respondeculo pri Libroservo kaj la redaktoro de nia magazino kunvenas ĉiusemajne, oni ne povas diri, ke ni ne rilatas unu al la alia, aŭ ke ni ne kunlaboras. Ni komentis tiun leteron, kiu ne estas privata afero, ĉar ĝi estis ricevita de la Prezidanto nome de ni ĉiuj, kaj kies temo estas sufiĉe publika: rifuzo akcepti postenon, ne pro personaj kialoj —eĉ se li simple ne volas, tio ja estas persona decido respektinda kaj ne publikigebla—, sed pro fundaj atakoj al HALE devigas nin atentigi la anaron pri tiu krizo. Mi ne scias, se estas multaj esperantaj asocioj kies 75% de estraranoj kunvenas semajne, sed mi suspektas, ke ne estas multaj. Ni nun ĵus organizas la 1-an Kongreso de HALE, io neniam antaŭe atingita. Estas vere, ke ni ne ĉiam respondas leterojn sufiĉe frue, sed kelkaj el ni havis problemojn prisanajn, kaj ne povis aktivi tiom multe, kiom ni volus. Sed eltiri el tio, ke la asocio ne funkcias, estas troigi la aferon. HALE estas kultura esperanta asocio. Ni ne estas revolucia, laborista asocio, kiel SAT, kiu volas ŝanĝi maljustajn statojn de aferoj. Ni nur estas kultura asocio, laŭ nia statuto. Tiusense mi kredas, ke ni faras nian laboron sufiĉe bone.






Nun ni havas krizon, ĉar ni ne havas vic-prezidanton. Eble en la Kongreso ni interkonsentos pri la afero. Estas la unua fojo, ke ni ne havas vic-prezidanto, sed nia prezidanto estas ankaŭ prezidanto de alia esperanta asocio.

# Enkonduko en muziko


## *Ni kantu*

Homo kantis antaŭ ol li lernis paroli, kaj sekve multe pli frue ol li lernis fari muzikan instrumenton. Aldone, oni asertas ofte, ke neniu instrumento povas kompariĝi al homa kanto pri sia delikateco, nuanceco, kaj sentesprimo. Kiel ajn estu, ni konsideru la sekvantajn notojn:




La signo 𝄞 nomiĝas *sol*, kaj pro tio, ke ni metas ĝin sur la dua linio, signifas, ke ĉiu noto metita sur tiu linio estas la noto *sol*. La noto *la* estas en la sekvanta spaco inter tiu linio kaj la tria, la noto *si* kuŝas ĉe la tria linio, kaj denove en la tria spaco ni trovas la noton *do* —kompreneble en la oktavo sekvanta—. Se ni subeniras, ni trovas la noton *fa* sur la *spaco unua* (tiu inter la unua kaj la dua linioj). Sciante, ke la sekvo de notoj estas do-re-mi-fa-sol-la-si, ni povas supreniri kaj subeniri laŭ la *gamo* aŭ *skalo* por trovi la noton. Sub la noto sur la unua linio -*mi*- ni aldonas la noton *re* en la *unua aldona spaco*, kaj *do* sur la *unua aldona suba linio*.

Ĉion ĉi dirite, ni povas kanti la fragmenton supran. Ili estas la du unuaj mezuroj de fama franca infana kanto. La notoj estas do-re-mi-do, kaj se vi legas min en Interreto (http://www.distrito.com/esperanto/k42muz.htm), kliku sur la notoj kaj vi aŭdos la muzikon. La numeroj 4/4 signifas, ke la mezuro estas organizita en kvar partoj (unua kvar) kaj ke la figuro kiu daŭras tutan parton estas ♩—kiu nomiĝas *nigra*—. Kiam ni jam kantis bone *do-re-mi-do* (ni imagu, ke ni paŝas, kaj ni kantas po unu noto ĉiu paŝo). Nun ni povas lerni la duan parton:




La notoj nun estas *mi-fa-sol*, sed ni vidu, ke *sol* havas la *kapon* blanka. Ni nomas tiun figuron *blanka* figuro (aŭ simple, *blanko*), kaj ĝi daŭras du paŝojn, tio estas, du partojn de la mezuro: *mi-fa-sool*. Nun la afero komplikiĝas iomete:




*Sol-la-sol-fa* daŭras duonpaŝon (ĉiu noto, kompreneble, aŭ du paŝojn por la tuto): dum la unua paŝo ni kantu *sol-la* kaj dum la sekvanta paŝo ni diru *sol-fa*. La du sekvantajn paŝojn ni kantas *mi* kaj *do*. Nun ni venas al la lasta mezuro:

Ni ne trovas problemon nun por kanti tion, ĉu? Bone, nun ni bezonas alian



kantiston, kaj kiam ni atingas la trian mezuron, li aŭ ŝi komencu kanti la komencon, kaj ni havas duvoĉan kanton *Frere Jacques:*



# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO**

**Retskribu al
hale@distrito.com**

**http://www.distrito.com/esperanto/kajeroj.htm**

**http://members.xoom.com/Jesuo/kajeroj.htm**




**Depósito legal: Z-2398-88**

**Presejo: Alegría.**